
札幌エスペラント会　学習会 11 月開催予定

Kirikae H. skribas: Jam vintro forkuris. Sub la printempa brilo de hela suno kaj en la printempodora aero Ĝenerala Kunveno de SES okazis la 27-an de februaro. La decidoj estas jenaj: ⋆Per la bonvolo de bedaŭrata samideano Tojokura ni aĉetos kvin kopiojn da lastaj esperanto-japanaj kaj japano-esperantaj vortaroj por komencanta kurso. ⋆La jara kotizo de SES estas reduktita al 2,000 jenoj. Adresaroj disdoniĝos al ĉiu SES-ano. ⋆Kontribuu SES 通信 libere. ⋆Jara lernkunsido okazos en novembro. ⋆Zamenhofa Festo okazos la 11-an de decembro. ⋆Venontjara ĝenerala kunveno okazos la 27-an de februaro. ⋆Je la okazo freŝa prezidanto estos elektita.

## Kanto de l' vagabondo[1]

Vagabond' de l' mondo estas mi,
vaganta sur la ter'.
En animo regas harmoni'
kun ĝojo kaj esper'.
Se trompas min la sortfavor',
perfidas amatin';
vagabond' de l' mondo en la kor'
mi restos ĝis la fin'.

*(Nikolsk-Ussurijsk)*



Julio Baghy 1891-1962, Budapest

[1]el *Ora duopo: Jubilea libro pri Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay.* Budapest: 1966. Eldonita en la 75-a naskiĝjaro de la du eminentaj verkistoj okaze de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto.